

ESK ankaŭ invitas esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel, ke esperantlingvaj infanoj skribos ĉijare al Avo Frosto. Por ricevi pliajn informojn aŭ por trakti problemetojn kontaktu ilin je: avofrosto@yahoo.ca

ESK bonvenigas ankaŭ aliajn komentojn kaj ekzemplerojn de revuoj, kie ĉi-tiu informo aperas. Feliĉan Kristnaskon! Ho! Ho! Ho!

Seksedukado 0,001



**Dio kreis bebon knaban
esti vigla laŭ natur’:
Kuri, ludi, karamboli,
fali, salti, kaprioli.
Daŭran ŝtofon Li bezonis,
Tajlis el fortika ŝnur’.**

**De la ŝnuro iom restis;
Kion tajli el la plus’?
Etan aĵon Li fasonis,
Kaj Li nomis ĝin “falus”.**

**Dio kreis bebon inan
esti milda laŭ inklin’:
Kudri, kanti, multbabili,
ridi, danci, hejmutili.
Fajnan punton Ŝi bezonis,
Por plej taŭge tajli ŝin.**

**Sed la punto ne sufiĉis,
Mankis ŝtofo – estis ŝok’!
Sed Ŝi estas nun kontenta,
ke nur restas eta lok’.**

— Steĉjo



RALPH LINDSAY HARRY

Antaŭnelonge mortis aŭstralia samideano Ralph Harry, kiu aĝis 85 jarojn. Lia filo John Harry aperigis la 24-an de oktobro 2002 en la *Sydney Morning Herald* (Sidneja matena heroldo) nekrologon de pli ol 2000 vortoj pri ĉi tiu „bonkora majstro de diplomatio”, la „nelaŭdita heroo de la ANZUS-a pakto”. S-ro Harry plenumis distingnan karieron kiel diplomato kun tro multaj atingajoj por mencii ĉi tie. Li servis sian landon diversmaniere: inter ili kiel stipendiulo de Rhodes ĉe Oksfordo; diplomato en diversaj lokoj kiel Ĝenevo, Singapuro, Vaŝingtono kaj Otavo; gvidanto de aŭstraliaj delegacioj al diversaj UN-aj konferencoj pri laboro, sano, leĝo de la maro, komerco, kaj ekonomia disvolviĝo; direktoro de la Aŭstralia Sekurec-Informa Servo; ambasadoro en Belgio kaj la Eŭropa Komunumo, okcidenta Germanio, suda Vjetnamio, kaj la Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko; kaj direktoro de la Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj. Li multe fieris, inter aliaj aferoj, pro sia kontribuo al la verkado kaj adopto de la „Universala deklaro pri homaj rajtoj”. Li bone konis la mondon.

Tra sia vivo, S-ro Harry daŭre interesiĝis pri Esperanto. Ignorante la skeptikulojn - eĉ tiujn en sia propra familio - li aktive propagandis por Esperanto kaj multe kontribuis kiel verkisto, kongresanto, vortaristo, tradukisto kaj administranto. Li forte kredis je la ebleco de internacia lingvo por malaltigi la barilojn de suspekemo kaj netoleremo inter nacioj. Li kontribuis al la dissendo de esperantlingvaj radio-programoj en Aŭstralio, kaj li verkis kelkajn librojn pri Esperanto. Por la olimpikaj ludoj en Munkeno (1972) li kreis multlingvan frazlibreton por la atletoj kiu inkluzivis Esperanton, kaj li plibonigis ĝin por postaj olimpikaj ludoj. Inter liaj aliaj libroj estis *La diplomato kiu ridis* (1983); ekzempleron li donacis al la Libraro Ludovika en Halifakso.

Post la Universala Kongreso en Berlino, S-ro Harry vizitis Halifakson en aŭgusto 1999 (unu el la multaj vizitetoj kiujn li faris dum tiu ĉirkaŭ-la-monda vojaĝo) kaj li ĉeestis nian lokan kunveneton. Li regalis nin per multaj interesaj kaj amuzaj rakontoj pri sia kariero kaj siaj travivaĵoj, kaj enketis kun intereso pri la loka esperanta rondo. Li ankaŭ ĝuis vojaĝeton tra la provinco por rigardi la vidindaĵojn. Kiam li rigardis min kun rideto tra duonfermitaj okuloj, mi povis imagi kiel nenio eskapis lian observon kaj memoron. Dum sia tuta vivo Ralph Harry strebis por, kaj multe kontribuis al la pliboniĝo de la homaro pere de internaciaj leĝoj, internaciaj institucioj kaj ankaŭ internacia lingvo.

— Bob Williamson

JOZEFO LADISLAO VICTORO LENKEI

En majo mortis samideano Jozefo Ladislao Victorro LENKEI. Li aĝis 88 jarojn. Li loĝis en Oradea, Rumanio, kaj estis fervora kaj veterana Esperantisto. Li estis kaj leganto de kaj kontribuanto al nia gazeteto. Lia traduko de „La Unua Letero”, satirpoemo fare de la eminenta rumana poeto, Mihail EMINESCU, estis la ĉefartikolo en *Inter Ni* en Marto, 2000. Kiam oni demandis lin, kiam en la vivo li estis plej feliĉa, li respondis, ke estis kiam li sukcesis realiĝi al U.E.A. en la jaro 1965.

Estis mia privilegio dufoje viziti S-ron LENKEI en Oradea, dank’ al nia komuna amiko, Attila MAKAY, kiu verkis omaĝon al li en la aŭtuna numero de *Bazaro*. Estis tute evidente al mi, ke S-ro LENKEI havis du grandajn pasiojn: Esperanto kaj literaturo, ĉu esperanta, ĉu rumana. Esperantujo ja fariĝis iom mankohava pro lia forpaso.

— Steĉjo Norvell

Ni ĵus ricevis bonan novaĵon per la Tut-Tera Teksaĵo de Helga Farukuoye de la Esperanto-Muzeo en Vieno: Ses jaroj da laboro por enigi informon en la komputilan datenbankon atingis la unuan konkludon. Estas nun 29.000 rikordoj en la plej granda datenbanko pri Esperanto kaj interlingvistiko. Kompreneble la nombro de rikordoj daŭre pligrandiĝos, laŭ novaj libroj kaj periodaĵoj ricevitaj fare de la biblioteko. *Inter Ni* gratulas al Christian Cimpa, Helga Farukuoye kaj Herbert Mayer pro la grava tasko bone farita.

Vi mem povas serĉi la kolektaĵon per la programo TROVANTO. Nur necesas atingi la hejmpaĝon kun la elektronika katalogo TROVANTO:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

